

**33-a Jarkolekto \* Junio 2019 \* N-ro 113**



**NERVA**  
**Ruĝa rivero kiu ŝprucigas feron**

Gazeto Andaluza  
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.  
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ  
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE  
Vicente HERRERA COBO

## ENHAVO

Esperanto en Andaluzio .....	3
Karnavalo en Kadizo .....	8
Lingva Angulo: Ĉiu / Ĉiuj / Tuta / Tutaj.....	13
Tiuj Antikvaj Moneroj .....	18
79-a Hispana Kongreso de Esperanto .....	20
Kronviruso kaj Turismo. Kaj pri la esperantistaro? .....	21
Turismi en “ <i>Nerva</i> ” .....	24
105-a Universala Kongreso de Esperanto .....	28
Paĝoj pri Nia Historio: Juan Lamonedá Fernández .....	29
Flamenko: “ <i>Trillera, la sen-gitara kantaĵo</i> ” .....	32
Andaluza Kuirarto: “ <i>Jibias con Gurumelos</i> ” .....	34
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio: “La kastelo-hotelo de Sankta Katerino en Jaeno” .....	36
Krucvortenigo kaj Rebuso.....	39
Humuro .....	42

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ESPERANTO EN ANDALUZIO



### ➤ Zamenhofa Festo en Sevilo.

Kiel ofte, la esperantistaro feste renkontiĝas meze de la monato decembro honore al L. Zamenhof, aŭtoro de la internacia lingvo. En Andaluzio fine de 2019 la plej grava renkontiĝo okazis en Sevilo, organizita de la tiea grupo kun la partopreno de dudeko da sevilaj geesperantistoj kaj ankaŭ invititoj de Malago.

La renkontiĝo okazis en komforta ejo, tie ne mankis bongustaj manĝaĵoj kaj bonega etoso. Okaze de la festo oni debatis pri diversaj ontaj projektoj kaj kompreneble oni profitis por praktiki la lingvon.



Ĉeestantoj al la Zamenhofa Festo en Sevilo – Decembro 2019



S-ro Antonio Rodríguez Gasch alparolas la ĉeestantoj.

➤ **Francisko Azorín kiel temo okaze de kurso en Kordovo.**

La Edukacia Departamento en Kordovo de la Andaluzia Registaro organizis dum la monatoj oktobro kaj novembro de 2019 kurson por sciigi al instruistoj pri la plej elstaraj kordovanoj. La kurso konsistis en promenadoj tra la urbo Kordovo kun la celo sciigi al la instruistoj pri la lokoj rilataj al tiuj elstaraj kordovanoj kaj kompreneble pri la homoj mem.

Unu el la ĉefroluloj de la kurso estis la arkitekto Francisko Azorín Izquierdo, ankaŭ tre konata en Kordovo

pro siaj streboj en la disvastigo de Esperanto dum la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento. Manuel García Parody, kordova historiisto, estis la respondeculo de la kurso kaj li iomete parolis pri la esperanto-agado de la kordova arkitekto. Dank'al la partopreno en la kurso de Cristina Pérez, kordova esperantistino, la ceteraj ĉeestantoj kaj la propra



Karikaturo de Francisko Azorín Izquierdo sur ĵurnalo de la 20-aj jaroj.

respondeculo de la kurso ricevis pliajn novajn sciigojn pri la figuro de Francisko Azorín Izquierdo kiel esperantisto.

### ➤ **Renkontiĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en Malago.**

La pasintan 9-an de novembro 2019 okazis en Malago la jara renkontiĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La estraro prezentis la rezultojn de la tri kongresoj organizitaj en Malago en la monato majo, tiuj andaluzia, hispana kaj internacia fervojista. La fruktoj de ĉi tiu renkontiĝo estas ege kontentigaj pro la partopreno de preskaŭ ducento da gesamideanoj de la tuta mondo.



Oni debatis ankaŭ pri la ebla okazigo en Andaluzio, dum la jaro 2020, de la Internacia Esperantista Semajno, pro la fakto ke tiu renkontiĝo jam ne okazos plu en Katalunio kiel ĝis nun. La estraro kompromisis pristudi la eblecojn organizi ĉi tiun kulturalan esperanto-renkontiĝon en la urbo Torokso, aŭ en alia de la Suna Marbordo. La nuntempa situacio de la eldonaĵoj de la andaluzia asocio ankaŭ estis pridiskutita afero. Tiel, la redaktoro de *GAZETO ANDALUZIA*

informis pri la demarŝoj farotaj cele la atingon de la akurata apero de la revuo, tio espereble okazos jam dum la somero de la jaro 2020 post la ofta aperigo de novaj numeroj de la revuo. La redaktoro de *AEU-Bulteno* petis la kunlaboron de ĉiuj membroj de la asocio en la redaktado de artikoloj, informoj, ktp.

La kasistino de la andaluzia E-asocio prezentis la financon konkludon ĝis la monato decembro 2018, al tio sendube oni devos aldoni la mon-profitojn de la tri kongresoj okazigitaj en Malago kio ja certigos la financajn rimedojn por la agadoj de nia asocio. La ĉeestantoj gratulis al S-ro Antonio Fabián Jiménez pro la sukcesa okazigo de E-agadoj en la Gimnazio Almenara de Vélez-Málaga, kie oi instruas la internacian lingvon oficiale agnoskita kaj eĉ kun akademia valoro. Ankaŭ oni gratulis al S-ro Vicente Manzano, kiu nuntempe sekvas la studojn pri Esperantologio kaj Interlingvistiko en la Universitato de Poznano (Pollando), dank'al la stipendio "Felipe González del Pino" kreita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Ankaŭ oni debatis la aferon pri la petoj al kelkaj universitatoj en Andaluzio cele la agnoskon de la diplomo de Esperanto, nivelo B1, de la Universitato de Budapeŝto (Hungario). S-ro Alejandro Burgos informis pri sia preteco prezenti tiun peton al kelkaj departementoj de la Universitato de Granado. Same, S-ro Carlos Spinola sciigis pri la demarŝoj rilate ĉi saman aferon en la Universitato de Malago.

Fine, laŭ la statutoj de la asocio estis tempo por nomumi novan estraron. Ununanime oni akceptis jenajn kandidatojn kiuj laboros dum la jaroj 2020-2022:

Prezidanto: Ángel Arquillos López (Malago)

Vic-prezidanto: Fátima Jiménez García (Arundo)

Sekretario: José María Rodríguez Hernández (Kordovo)

Kasisto: Mariló Torreos Mateos (Malago)

Voĉ-donantoj: Jordi Lieter García (Almerio)

Carlos Spinola (Malago)

Juan García del Río (Malago)

Alejandro Burgos Escalante (Tebo)

Juan Díaz Casado (Campillos)

## ➤ Esperanto en Granado.

La nova jaro 2020 alportis bonegan novaĵon por Esperanto en Andaluzio: oni ekorganizas nian lingvon kaj movadon en la urbo Granado.

Granado estas kulturema urbo kun gravega universitato, do, sendube kiu ajn kultura agado en la urbo intime rilatas al universitato, same Esperanto. Nia samideano Alejandro Burgos estas universitata studento en la urbo kaj li decidis kontakti kun la tiea esperantistaro, organizi oftajn renkontiĝojn kaj kursojn pri la internacia lingvo.

La kontaktiloj uzataj por ĉiuj interesitoj en la internacia lingvo en la urbo kaj provinco estas la ret-poŝto: [granada@esperanto.ac](mailto:granada@esperanto.ac) kaj la blogon: [esperantoengranada.blogspot.com](http://esperantoengranada.blogspot.com) Bv. uzi jenajn adresojn por kontakti kun la e-movado en Granado. Kompreneble ne estas necese esti universitatano aŭ havi rilatojn kun tiu instrua centro. La unua agado de la grupo estas la organizado de kursoj de esperanto. Oni pripensis du nivelojn:

- Por komencantoj (A1 kaj A2): por tiuj kiuj scias nenion pri la lingvo aŭ kun malmultaj konoj pri ĝi.
- Perfektiga kurso (B1 kaj B2): por tiuj kiuj jam estas kapablaj konversacii en esperanto, kvankam kun limigita vortaro.

La daŭro de la kursoj, horo kaj loko ankoraŭ ne estas deciditaj kaj ĉio dependos de la nombro da aliĝintoj. Do, se vi interesiĝas pri Esperanto kaj vi loĝas en Granado aŭ proksime, bv. kontakti kun:

**[granada@esperanto.ac](mailto:granada@esperanto.ac)**

Kompreneble ĉiuj kursoj estos tute senpagaj.

## KARNAVALO EN KADIZO

Kvankam la origino de la karnavala festo troviĝas en la klasikaj romia kaj greka kulturo, certe la karnavala festo de Kadizo, la plej fama en Andaluzio, aperis dum kristnaska epoko. La kristanisma kulturo ordigas la festojn kaj ĉefajn okazintaĵojn laŭ monatoj kaj sezonoj, tiel estas eble trovi momentojn kiam ĉio estas malpermesita kaj regas malfeliĉo, tio estas dum Karesmo kaj Pasko, sed antaŭ tiuj semajnoj ekspluatas ĝojon, tio estas la karnavalo, kiam oni akceptas la kontentigon de la karnaj deziroj.



Ludado de ĥoro en la Teatro "Falla" dum Karnavalo en Kadizo.

La karnavala festo en Kadizo naskiĝis pro la influo de la italaj, ĉefe ĝenevaj komercistoj, kiuj alvenis en la urbon dum la 15-a jarcento. Karnavalo en Italio estas plena je maskoj, paper-serpentoj, buntaj vestaĵoj, konfetoj... kaj tio estis tute akceptitaj de la kadizanoj. Tiel, dum la 16-a jarcento laŭ tiamaj verkistoj, kadizaninoj prenis florojn kaj ili ĵetis unu sur la aliajn ŝerce kaj mokeme dum la karnavala semajno.

La festo kreskiĝis kaj tiel en la jaro 1636 aperis informo pri plendo de mar-oficiro kiu ne sukcesis trovi laboristojn por ripari ŝipon,



pro la fakto, ke ĉiuj laboristoj partoprenis en la karnavala festo kaj ne iris por labori. Do, en tiuj jaroj la karnavala festo en Kadizo fariĝis la plej fama kaj diboĉa renkontiĝo de la popolo kaj tio vere estis minaco por la aŭtoritatuloj kaj por la katolika eklezio, en la jaro 1678 eĉ oni juĝis al pastro kiu, laŭdire, seksumis kun virino kiun li konis dum karnavalo. Eble pro tio, kelkaj jaroj poste oni malpermesis al pastraj studentoj partopreni en la karnavalaj festoj, oni aprobis ankaŭ dekreton kiuj malpermesis la uzon de maskoj kaj tiel oni evitis insultojn de nekonatuloj.



Karnavalaj kantaĵoj en Kadizo

Komence de la 19-a jarcento, kiam la urbo Kadizo estis la sola hispana teritorio neokupata de la franca armeo, la karnavalaj festoj daŭriĝis en Kadizo, malgraŭ la sieĝo-stato pro la napeoleona minaco. Post la milito la urbestro aprobis dekreton en la jaro 1816 kiu malpermesis la karnavalajn festojn, kompreneble tiu normo estis mokeme ricevata kaj kadizanoj dum tiuj jaroj kaj la sekvantaj diboĉis okaze de Karnavalo.

En la jaro 1821 aperas la unua bando da homoj kiuj ludas gitarojn kaj kantas mokemajn kantaĵojn, la nomo de la bando estis “*La Galegoj*”. Dum la sekvantaj jaroj novaj bandoj aperis kaj ankaŭ la kutimo peti monon al aŭskultantoj surstrate post la kantaĵoj. Fine de la 19-a jarcento multnombraj bandoj kantis surstrate, kvankam ili devis prezenti al la aŭtoritatuloj la tekstojn de la kantaĵoj, tiel oni evitis ofendojn ĉar tiuj bandoj rajtis kanti nur tiujn kantaĵojn antaŭe aprobitaj de la municipa registaro. Dank’al tiu cenzuro, nuntempe estas eble koni kiom da bandoj ludis dum antikvaj karnavalaj festoj en Kadizo, la testojn de la kantaĵoj kaj eĉ la nomojn de la membroj. Tamen

La urbestro ne nur kontrolis la bandojn, ankaŭ apogis ilin ĉar ĉiujare oni aprobis monon el la municipa buĝeto por subvencii ĉi tiujn grupojn.

Komence de la 20-a jardeko kaj dank'al ĉi tiu municipa apogo, la karnavalaj festoj vivis gloran epokon en Kadizo, tiel, fekundaj populaj verkistoj ekverkis tekstojn por la karnavalajn kantaĵoj, sendube la plej fama estis Antonio Rodríguez Martínez *“el tío de la tiza”* (la kretulo), aŭtoro de la tango *“Los duros antiguos”* (la antikvaj moneroj), konsiderata nun kiel la himno de la kadiza karnavalo, kies traduko en esperanton vi trovos sur la paĝo 19a. Okaze de la civila milito kaj la nova politika reĝimo la karnavalaj festoj restis malpermesataj, tamen en la jaro 1948 la provinca registaro rajtigis kelkajn bandojn kanti surstrate, ĉar ili komprenis ke temis pri popola kutimo kiun ne povus esti malpermesita. Tamen la nomo ja ŝanĝiĝis, oni forgesis la vorton *“Karnavalo”* kaj tiel oni parolis pri la *“Tipaj Kadizaj Festoj”*.



Bronza statuo en Kadizo omaĝas al *“El tío de la tiza”*

La nova politika demokratia reĝimo en Hispanio post la jaro 1978 favoris la disvastigon de la karnavalaj festoj en Kadizo, kies konkurso en la *“Granda Teatro Falla”* estas eble sekvi per la andaluzia televido. Nuntempe ĉi tiuj festoj estas la imitinda modelo de ĉiuj aliaj karnavalaj festoj en Andaluzio.

Nuntempe ekzistas oficiala konkurso por tiuj kiuj deziras prezentis siajn kantaĵojn kaj maskovestojn laŭ diversaj branĉoj kiel ĥoroj, kvartetoj kaj aliaj muzikbandoj.

- Hispane: Coro      Esperante: Ĥoro

Temas pri kadiza karnavala muzik-bando, renkontiĝas en ĝi inter 14 kaj 45 homoj, kelkaj kantas kaj aliaj ludas muzikilojn. Temas pri la solaj bandoj en Kadizo kiu ludas tangojn. La temoj de la kantaĵoj povas esti ĉu mokemaj, ĉu poeziaj kaj eĉ por depostuli ion aŭ por kritiki kelkan aferon.

- Hispane: Chirigota      Esperante: Ĉirigoto

Apartenas al ĉi tiu karnavala bando inter 12 kaj 15 homoj. La tekstoj de la kantaĵoj de la ĉirigotoj estas plenaj je ŝercoj kaj ironio.

- Hispane: Comparsa      Esperante: Komparso

Renkontiĝas en ĉi tiu karnavala bando 14 homoj. La tekstoj de la kantaĵoj estas seriozaj, lirikaj kaj foje eĉ poeziaj. Tre similas al *ĉirigoto*, tamen la kritiko de la kantaĵoj estas pli eleganta.

- Hispane: Cuarteto      Esperante: Kvarteto

La kvarteto konsistas en 4 aŭ 5 homoj. Ili ne nur kantas, ili ankaŭ, en burleska maniero, parolas kaj imitas karakterizaĵojn de homoj aŭ situacioj.

- Hispane: Ilegales      Esperante: Ne-leĝuloj

Karnavalaj muzik-bandoj en Kadizo kiuj ne partoprenas en la oficiala konkurso ĉe la Teatro *Falla*, eble ĉar ili ne observas la neprajn kondiĉojn por partopreni aŭ simple, ĉar ili ne deziras fari tion. Ili ludas kaj kantas siajn kantaĵojn kaj parodiojn surstrate.

## ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac  
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

## HAZTE SOCIO DE LA *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac  
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

## Lingva Angulo

### ĈIU / ĈIUJ / TUTA / TUTAJ



Ni multfoje ripetas, ke la plej grava danĝero por hispano, eble ankaŭ por parolantoj de aliaj lingvoj, estas traduki rekte el la propra lingvo en esperanton. En esperanto ni devas elekti ĉiufoje la ĝustan vorton, do ni devas pensi, ke vortoj en esperanto foje ne estas uzataj kiel en la hispana, eĉ se la traduko de la vortoj tion pensigas al ni.

Unu el tiuj vortoj kiu povas kaŭzi problemojn al hispanlingvano estas *ĉiuj*, pro la fakto ke laŭ la vortaro ĝi estas tradukata kiel “todos”, kvankam se ni serĉas la pluralan adjektivon *tutaj*, ni vidos, ke ĝi havas la saman tradukon. Do, kiam uzi unu aŭ la alian. Ni vidu:

- *ĈIU* montras, senescepte, la individuojn de grupo da personoj, aĵoj aŭ aferoj.

Se ĝi aperas sub singulara formo *ĉiu* temas pri unu-nombra kvanto:

- Ĉiu lernanto devas alporti sian libron.  
*Cada alumno debe traer su libro.*

- Se ĝi aperas plurale: *ĈIUJ* temas pri multe-nombra grupo:

- Ĉiuj lernantoj devas alporti siajn librojn.  
*Todos los alumnos deben traer sus libros.*

Atentu ! Vidu, ke oni

uzas la artikolon “LA” nek antaŭ, nek post “ĉiu”. Tiel, en la hispana lingvo ni diras: “*todos los alumnos...*”, tamen en esperanto oni uzas nur *ĉiuj*, kaj ne “*ĉiuj la*” aŭ “*la ĉiuj*”.

La uzo de *ĉiu* aŭ *ĉiuj* dependas de la parolanto mem. Se oni uzas *ĉiu*, la individuoj de la grupo estas aparte konsiderataj; tamen, se oni uzas *ĉiuj*, oni pensas pri la tuta grupo kune. Tiu distingo povas ne esti grava, tamen alifoje la diferenco estas granda, ni vidu:

- Mi donis unu eŭron al ĉiu infano.

*Yo di un euro a cada niño.*

Tio signifas, ke la infano A ricevis unu eŭron, la infano B alian eŭron, la infano C same... kaj ĉi tiel ĝis la lasta infano de la grupo.

Tamen, se oni diras:

- Mi donis unu eŭron al ĉiuj infanoj.

*Yo di un euro a todos los niños.*

Tio signifas, ke la tuta grupo de infanoj ricevis nur unu eŭron, tio estas, unu eŭro por la tuta grupo, ne por ĉiu infano.

Alie, *ĉiu* devas aperi sub singulara formo se ĝi rilatas al unu homo, aĵo aŭ afero. Tiel:

- Ĉiu infano, ĉiu amiko, ĉiu libro, ĉiu sukceso...

Kaj aperi sub plurala formo *ĉiuj*, se ĝi rilatas al kelkaj homoj, aĵoj aŭ aferoj:

- Ni ĉiuj jam vizitis la fabrikon.

*Todos nosotros ya visitamos la fábrica.*

- Ĉiuj viaj amikoj lernis la rusan lingvon.

*Todos vuestros amigos aprendieron el idioma ruso.*

Se temas pri du homoj, aĵoj aŭ aferoj estas preferinde uzi *ambaŭ*.

Kiel dirite, estas grave ne traduki rekte el la hispana en esperanton kaj tio eĉ plie validas se temas pri la uzo de *ĉiuj*. Tiel, en la hispana lingvo ni diras:

- En Granada visité todos los monumentos importantes.

Vidu, en hispana lingvo oni diras: “*todos los...*”

En esperanto oni ne povas diri “*ĉiuj la...*”, bv. ne traduki rekte el la hispana lingvo en esperanton. Tiel en esperanto ni diras:

- En Granada mi vizitis ĉiujn gravajn monumentojn.

Do, se vi uzas *ĉiu* aŭ *ĉiuj* neniam enmetu antaŭ aŭ post ili la artikolon LA. Skribu NENIAM: *la ĉiuj* aŭ *ĉiuj la...*

**Memoru:** ĉiu + homo, aĵo aŭ afero.

ĉiuj + homoj, aĵoj aŭ aferoj.

- TUTA / TUTAJ

Kiu diferenco ekzistas inter *ĉiuj* kaj *tutaj*? Ambaŭ vortoj estas tradukeblaj en la hispana lingvo kiel “*Todos*”, tamen reale ili ne signifas same. Ni vidu la diferencojn: kiel dirite, *ĉiu* aŭ *ĉiuj* montras senescepte la membrojn de grupo.

- Ĉiu homo rajtas esti libera.

*Todo ser humano tiene derecho a ser libre.*

- Ĉiuj amikoj kunlaboris en la konstruado de la detruita domo.

*Todos los amigos colaboraron en la construcción de la casa destruida.*

Kion montras do, la adjektivo *Tuta* aŭ la adverbo *Tute*?

*Tuta* montras la ideon, ke io estas kompleta. Kiam oni uzas *tuta* apud kelka afero, aĵo aŭ eĉ homo, tio signifas, ke ĝi entenas ĉiujn siajn partojn sen escepto aŭ manko. Ne temas pri grupo sed pri individuo aŭ aĵo kiu aperas kompleta, integra. Ekzemple:

- Mi legis la tutan libron.  
*Yo leí todo el libro.*

Vidu la diferencon kun la frazo:

- Mi legis ĉiujn librojn de la biblioteko.  
*Me he leído todos los libros de la biblioteca.*

En la unua frazo: “*la tuta libro*”, mi montras, ke mi legis la tutaĵon de la libro, mi lasis ne-legita eĉ ne unu folion. En la dua frazo “*ĉiuj libroj*”, mi montras, ke ekzistas grupo de aĵoj, ĉi-foje libroj en biblioteko, kaj mi legis ĉiujn ilin.

Kaj se paroli pri la uzado de *tuta* kaj la artikolo *la*, oni devas averti, ke la artikolo iras antaŭ la adjektivo *tuta*, ne poste, kvankam en la hispana oni povas diri: “*toda la...*”, en esperanto devas esti: “*la tuta...*”. Memoru, ne temas pri rekte traduki el la hispana en esperanton. Tiel:

- Mi plenumis la tutan taskon.  
*Yo completé toda la tarea.*

Neniam: “*tutan la taskon*”.

Kaj se oni uzas la adverbbon *tute*, ĝi povas esti tradukita kiel “*por completo*”, “*totalmente*”. Tiel:

- Li aperis tute nuda sur la scenejo.  
*El apareció totalmente desnudo sobre el escenario.*
- Ĉu vi volas iomete praktiki ĉi ĉion?

Nu, traduku en esperanton jenajn frazojn:

- Yo revisé cada rueda del vehículo  
Rueda: *rado*; revisar: *revizii*; vehículo: *veturilo, aŭtomobilo*.



- 
- Todos mis amigos han decidido venir a mi casa mañana.  
Decidir: *decidi*; mañana: *morgaŭ*;

- 
- Cada ser humano debe encontrar su propio camino.  
Encontrar: *trovi* ; propio: *propra*; camino: *vojo*.

- 
- La máquina se estropeó por completo.  
Máquina: *maŝino*; estropearse: *panei*;

---

Solvoj:

- Mi reviziis ĉiun radon de la veturilo.
- Ĉiuj miaj amikoj decidis veni morgaŭ ĉe mi.
- Ĉiu homo devas trovi sian propran vojon.
- La maŝino tute paneis.



## TIUJ ANTIKVAJ MONEROJ

La 3-an de junio 1904 fiŝkaptisto enterigis fiŝajn restaĵojn en plaĝo de Kadizo. Kiam li fosis malgrandan truon en la sablo ĝuste tie aperis arĝentaj moneroj datumitaj en la 18-a jarcento. Li plenigis siajn poŝojn per kelkaj el tiuj moneroj kaj foriris. La novaĵo tuj trakuris la stratojn de Kadizo kaj post kelkaj tagoj amaso da homoj iris en la plaĝon por serĉi tiujn monerojn, kiuj baldaŭ estis konataj kiel “*los duros antiguos*” (la antikvaj duroj; la antikvaj moneroj).

En la sekvanta jaro okaze de la karnavala festo la plej fama tango estis tiu komponita de Antonio Rodríguez Martínez *el tío de la tiza* (la kretulo), sub la titolo “*Los duros antiguos*”, kantaĵo kiu ankoraŭ hodiaŭ estas ludata ĉiujare okaze de la karnavalaj festoj en Kadizo. Ĝi estas konsiderata kiel la himno de la Karnavalo en Kadizo.

Se vi deziras aŭskulti la kantaĵon, ĝi aperas en Jutubo ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=HdcaxH9UgyE>



Ho, tiuj antikvaj moneroj  
pri kiuj en Kadizo ĉiuj memoras,  
trovitaj ili amase  
enterigitaj en la plaĝ'  
tre fama en la tuta mondo  
ja estis tiu ridindaĵ'.

Tie ĉiuj kadizanoj  
kun hakfosiloj,  
mia bopatrin' ankaŭ  
malgraŭ ŝi estis jam oldulino,  
per-unge iĝis fos',  
tion mi jam vidis,  
dum pli ol kvar tagoj  
kaj sen ripoz'.

Ĉiuj amase en la plaĝo  
fosis kun espero  
gardu nin Sankta Kleto!  
Kia granda mizero.  
Iuj vere fiŝkaptis  
monerojn sur-plaĝe,  
tamen plejmulto  
eĉ ne unu domaĝe.

Mia bopatrin', jam dirite,  
tie estis dum tuta semajno,  
ŝi fosis ĉiuvespere  
dumnokte kaj ree matene.  
Ŝi perdis ungojn kaj harojn  
kaj ja ŝi kalva fariĝis  
kaj anstataŭ dek monerojn  
trafis ŝin forta la pneŭmonio.  
Ekde tiam ŝi ja elfosas  
kviete kuŝita sub bunta lilio. *Ree*



De la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 2020 okazos en la urbo Comillas (Santander), la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Ne hezitu ĉeesti la kongreson, tie vi povos ĝui mirindan esperanto-etoson. Laŭ la programo jen kelkaj partoprenindaj agadoj:

- Ekskursoj: Santillana del Mar kaj Groto “El Soplao”.
- Prelegoj de José Antonio del Barrio, Ana Manero, Lorenzo Noguero, Ilona Koutny, Antonio Valén...
- Ateliero: Lernejo kaj ludu “Kantabran Kegloludon” (bolo palma).
- Koncertoj: JoMo, Kaj Tiel Plu, Kjara...

Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe:


<https://www.esperanto.es/kantea/category/congresos/>

Ĝis februaro 2020 aliĝis: 127 homoj.

## Kronviruso kaj turismo. Kaj pri la esperantistaro?

Laŭ la papilia efiko malgrandaj modifoj de la komencaj kondiĉoj en dinamika sistemo povas ŝanĝi la longtempan funkciadon de la tuta sistemo kaj tio povas konduki al ne-atendita ĉena reakcio. Laŭ tiu efiko ŝanĝiĝon de kompleksaj sistemoj oni ne povas aŭguri sufiĉe bone je difinita tempo.

Tio mem jam estas videbla okaze de la nuntempa krizo de la kronvirusa malsano COVID-19. Ĉi tiu morbo komenciĝis en la provinco Uhano en Ĉinio kaj ĝis nun provokis pli ol mil mortintoj ne nur en tiu lando sed jam ankaŭ en la tuta mondo. Kaj ne nur homaj viktimoj, ankaŭ provokis ĉi tiu viruso ekonomiajn malfacilaĵoj al negocoj kaj industrioj. En Hispanio, la organizantoj nuligis la okazigon en Barcelono de la kongreso dediĉita al portebloj telefonoj, unuamomente pripensita por la monato februraro 2020, oni atendis dum tiu konferenco la ĉeeston de pli ol cent mil homoj de la tuta mondo. Tamen, la jam decidita neĉesto de la plej gravaj orientaj firmaoj, tiuj de Ĉinio, Koreio kaj Japanio, malebligis la okazigon de ĉi tiu grava renkontiĝo.



Kronvirusoj el mikroskopa perspektivo

La ĉeno ne haltiĝis kaj tiel aliaj industrioj, kiel turismo, ankaŭ suferas pro la apero de ĉi tiu nova kronviruso. Oni nuligis milojn da vojaĝoj el kaj en orientajn landojn. Verŝajne ne temas pri tre disvastigita datumo: dum la lastaj jaroj la aviadila turismo el Ĉinio kvinobliĝis, nuntempe ĉi tiu azia lando estas la zono en la mondo kie pli da homoj vojaĝas eksterlanden, tamen laŭ informo de la Interancia Civila Aviada Organizaĵo flugoj el aŭ en Ĉinion malpliĝis 80 procente.

Ankaŭ estas necese substreki la fakton, ke ĉinaj turistoj elspezas pli ol 240.000 milionojn da eŭroj, kvankam verdire la plejmulto el ili vojaĝas en apudajn ekonomiajn zonojn de Ĉinio mem, kiel Hong-kongo kaj Makao aŭ en aliajn landojn, kiel Tajlando. Laŭ informoj, nuntempe la kazinoj en Makao, kiuj estas la ĉefa industrio de la eks-portugala kolonio, estas preskaŭ dezertoj.

Same okazas rilate plezurŝipojn. La informoj kiuj aperas sur-televide kie videblis grandajn ŝiponj plenaj je turistoj kiuj devas resti tie en kvarenteno en japanaj havenoj tre malhelpas ĉi tian turismo, eĉ se la vojaĝo okazas el aŭ en zonojn kie la kronviruso ne aperis. Do, multaj eblaj turistoj preferas resti hejme.



La plezur-ŝipo *Diamond Princess* izoliĝita pro kvarenteno en Jokohamo (Japanio)

Kaj ĉi ĉio ne okazas nur rilate orientajn landojn, ankaŭ en Eŭropo la kronviruso komencas damaĝi ne nur homojn sed ankaŭ la ekonomion de kelkaj ŝtatoj. Tiel, la italaj aŭtoritatoj ĵus izoligis komplete tiujn vilaĝojn kie aperis kelkaj kazoj de ĉi tiu nova gripo Covid-19, do, Milano, belega urbo kun miloj da turistoj surstrate estas nun preskaŭ dezerta urbo. Same okazis rilate multajn studentajn vojaĝojn kiuj jam anstataŭis Italion per aliaj landoj kie la malsano ankoraŭ ne manifestiĝis. Alia ĵusa lasta informo sciigas pri la nuligo de la plej grava foiro por turism-agentoj en Berlino.

Kio okazos estontece? Grava momento, se paroli pri la ĉi-jara turismo, estos la okazigo de la Olimpikaj Ludoj en Tokio de la 24a de julio ĝis la 9a de aŭgusto. Estas certe, ke jam nuligiĝis multaj aliaj eventoj, eĉ sportaj, tamen neniu pensas pri la prokrastigo de la plej impona sporta festo en la mondo, eĉ se ĝi okazos proksime al lando kie komenciĝis ĉi tiu malsana problemo. Same, ni ne povas forgesi ke alia turisma evento okazos dumsomere, eble pli modesta, tamen por ni pli grava: la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Montrealo (Kanado) de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto.

Ĉi tiu nordamerika lando nur informis pri deko da homoj suferantaj la malsanon Covid-19, preskaŭ ĉiuj ili infektiĝis pro homoj venintaj el Irano. Espereble ĉi ĉio solviĝos antaŭ la somero, estu tiel ke la problemo pri la kronviruso finiĝos post kelkaj monatoj post ĝia komenco, ĉar tio jam okazis en la jaro 2003, okaze de la kronvirusa pneŭmonito SARS. Tiam forpasis preskaŭ mil homoj kaj la problemo etendiĝis dum ses monatoj. Bedaŭrinde la nuntempa kronviruso jam kaŭzis pli da viktimoj ol tiu de antaŭ kelkaj jaroj kaj sendube la kolektiva kaj disvastiĝata timo pri kontaĝo de ĉi tiu nova malsano jam provokis tutmondan psikozon.

Ni, esperantistaro, devas agadi pli inteligente ol tiuj katastrofaj mesaĝoj aperantaj sur la amasmedioj. Dumsomere, kaj eĉ antaŭe, okazas niaj renkontiĝoj kaj kongresoj, la ĉefaj eventoj kie esperanto vivas. Se ni amase nuligas tiun partoprenon pro la psikoza timo al kontaĝoj, kvazaŭ zombia filmo, nia movado suferos fortan baton kaj tio vere ne devus okazi.



## Turismi en ... NERVA (Malago)

Nord-oriente de la onuba provinco troviĝas Nerva, proksime al ĝi naskiĝas la rivero Tinto kaj ĝi estas lulilo de la ministaj luktoj en la regiono Riotinto. La metaloj ludas kernan rolon en la historio de ĉi tiu zono. La plej antikvaj restaĵoj, apartenantaj al la Bronzepoko, pravas, ke ĉi tie disvolviĝis aktiva komerco de metaloj inter diversaj civilizacioj, ĉefe tarŝiŝaj kaj fenicaj. Tamen, la elfosado de metaloj je industria nivelo ne okazis ĝis la 18-a jarcento, kiam la reĝoj Filipo la 5-a kaj Karolo la 3-a favoris ekonomian kaj industrian antaŭenirigon. Ĉi tiu proceso kulminis kiam en la jaro 1873 la brita min-societo “*Riotinto Company Limited*” establis sin en ĉi tiu regiono. Tiel, la modesta vilaĝeto, kiu ekde la 16-a jarcento estis konata kiel “*Nuestra Señora de Riotinto*” kaj poste “*Aldea de Riotinto*” sendependiĝis el la vilaĝo “*Zalamea la Real*” en la jaro 1885 kun la nomo NERVA.



Blazono de  
NERVA

Kial ĉi tiu nomo? Nu, en la jaro 1762, en unu el la tieaj minejoj oni eltrovis bronzan platon de la romia epoko dediĉita al romia imperiestro *Marko Cocejo Nerva*. La nomon de la imperiestro oni prenis por nomi la novan vilaĝon.

Bedaŭrinde la ministra industrio ne nur alportis riĉecon al la zono, sed ankaŭ malbonan ekologian etoson. La industrio bezonis grandan amason da lignaĵo kaj tio provolis la detruon de grandaj arbaroj. Krome, la acida pluvado kaj la sulfurozaj fumoj endanĝerigis la homan vivon. Ĉi tiuj problemoj pliakrigis la malbonan vivon de la



popolo, kiu ankaŭ suferis la plialtigon de la prezoj de la nutraĵoj, kontrolitaj de la brita ministra kompanio. Ankaŭ la mekanizado de la ministraj laboroj, la maldungigoj kaj la politika subpremo favoris la aperon de movadoj, kiel la anarkismo kaj la socialismo, kiuj luktis favore al la ministro kaj ĉi ĉio finiĝis per popola ribelo en la jaro 1888, temis pri la tiel nomata “Ribelo de la fumoj”.

Meze de la 20-a jarcento la laboro en la minejoj ekmalpliigis, tio provokis amasan elmigradon de nervanoj en aliajn zonojn. Nuntempe, jam preskaŭ ne-ekzistanta la laboro en la minejoj, la arbara riĉeco estas la plej grava ekonomia rimedo de la vilaĝo. Antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis la planktado de oranĝ-arboj kaj lastatempe oni konstruis rurajn hotelojn por profiti la kamparan turismon.

## Monumentoj

### Urbodomo




Kiel dirite, la konstituo de la municipo Nerva okazis fine de la 19-a jarcento, do ĝi ne posedas tre antikvajn monumentojn. Verŝajne la plej grava konstruaĵo estas la urbodomo kun novmudehara stilo, la turo imitas minareton de islama moskeo.

### Naturaj Vojoj

Sendube la plej belaj allogaĵoj de Nerva troviĝas en la naturaj vojoj ekzistantaj ĉirkaŭ ĝi. Belega estas la vojo de la Ruĝaj Akvoj,

kondukanta al la “Peña de Hierro” (Rokego el Fero), la loko kie naskiĝas la rivero Tinto.



Naskiĝ-loko de la rivero TINTO. Ĉi tiu vorto en la hispana lingvo signifas “ruĝa” kaj ĝi alludas la ruĝan koloron de la akvo de la rivero, kaŭzita de la riĉeco de fera mineralo en la tuta zono.

## Festoj



La kavalkado de la Tri Reĝoj estas vizitinda festo kaj en la monato februraro okazas la Karnavalo, fama en la tuta regiono. La 7-a de aŭgusto okazas festo memore al la municipa sendependiĝo de la vilaĝo. Andaluzia tipa foiro okazas fine de aŭgusto honore al Sankta Bartolomeo.

Religia procesio honore al Sankta Bartolomeo, patrono de Nerva.

## Gastronomio

La gastronomio en Nerva elstariĝas pro la bongustaj viandaj stufaĵoj. Estas ankaŭ tre famaj tiuj kuirajoj kie estas uzataj *gurumelos*, temas pri la fungo “cezara amanito”. Sepioj kun *gurumelos* estas frandaĵo (vidu paĝon 34-an). Tradicie oni kuiras ankaŭ helikojn.

*Venont-numere TURISMI EN ....  
TREBUJENA (Kadizo)*



## 105-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

### *Montrealo (Kanado)*

De la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2020 okazos en la kanada urbo Montrealo la 105-a Universala Kongreso de Esperanto. La temo de la kongreso estos:

*Unuiĝintaj Nacioj 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo  
en ŝanĝiĝanta mondo.*

Jam aliĝis pli ol 800 homoj el 55 landoj, do ni invitas al Vi ĉeesti kaj partopreni en ĉi tiu impona festo de la tutmonda esperantistaro. Estas eble koni programon, koston de la partopreno, eblecojn loĝo en la TTT-paĝo: <https://esperanto2020.ca/eo/chefpagho/> La kongresejo troviĝas en la koro de la urbocentro, en la hotelo *Sheraton*. Kompreneble ekzistas multaj eblecoj tranokti en la urbo en ne tro multekostaj loĝejoj.

Se vi deziras partopreni aŭ ricevi pliajn informojn pri la Universala Kongreso de Esperanto 2020, ne hezitu kontakti kun:

Retpoŝto: [ikk@esperanto2020.ca](mailto:ikk@esperanto2020.ca)



[facebook.com/Montrealo.kongreso/](https://facebook.com/Montrealo.kongreso/)

Instagram: @Esperanto2020



**Paĝoj pri Nia Historio**  
***Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio***

***Juan Lamoneda Fernández***  
*La jaena socialisma ĵurnalisto*

Juan Lamoneda Fernández naskiĝis en la jaena vilaĝo *Begíjar* en la jaro 1889. En 1908 li aliĝis al socialisma sindikato UGT kaj unu jaro poste, en 1909, al la organizo Socialista Junularo. En la jaro 1913 li loĝis en Madrido, tie li aktivis en la socialista organizo de la hispana ĉefurbo aliĝita al PSOE, la hispana socialista partio. Estas necese diri, ke en la statutoj de la Socialisma Junulara Organizo, aprobitaj en la jaro 1906, aperis artikolo favore al la disvastigo de la internacia lingvo kaj al la adopto de Esperanto cele la interkomprenigon de la tutmonda junularo. Sendube, tiu estis la unua kontakto-punkto de ĉi tiu juna socialista jaenano kun la internacia lingvo.



Juan Lamoneda Fernández  
1889 - 1960

En la jaro 1914 li atingis postenojn kiel sekretario de la Urbodomo de *Lupión* (Jaeno), tie li laboris ĝis la jaro 1920. Dum tiuj jaroj la socialisma agado de Juan Lamoneda estis tre intensa, tiel li reprezentis la socialistan grupon de la jaena vilaĝo *Martos* en la kongreso de PSOE (Hispana Socialista Laborista Partio) en ĝia kongreso de la jaro 1919 kaj tiu grupo de *Begíjar* en 1920.

Dum tiuj jaroj, la 2-a jardeko de la pasinta jarcento, Juan Lamonededa konis la plej aktivan esperantiston en Jaeno tiumomente, S-ro Juan Anguita Galán, posedanto de libro-vendejo en la centra kvartalo de la urbo, politike S-ro Anguita sentis simpatian al socialismoj ideoj kaj kelkaj jaroj poste li eĉ estus aktiva membro de la Respublika Socialista Radikala Partio. Ambaŭ, S-ro Juan Anguita kaj Juan Lamonededa, partoprenis en la Hispana Esperantista Kongreso okazinta en la urbo Sevilo en la jaro 1928.



Sevilaj aŭtoritatuloj kaj delegitaro de la Hispana Esperantista Kongreso – Sevilo 1928

En la jaro 1931 Juan Lamonededa fariĝis redaktoro de la socialista ĵurnalo *EL SOCIALISTA*, tie ankaŭ partoprenis alia grava esperantisto, la kordova Francisko Azorín kiu eĉ verkis ene de propra sekcio en la socialista ĵurnalo sub la titolo “Noticias Esperantistas” (Esperantistaj Novaĵoj).

Proklamita la Hispana Respubliko en Hispanio en la jaro 1931, Juan Lamonededa okupis sin komplete al ĵurnalismo kaj al la politika agado. Tiel li, en la jaro 1934, jam estis prezidanto de la Nacia Unuiĝo

de Municipaj Laboristoj kaj en 1935 li kun-aŭtoris la municipan leĝon. Kiam hispanoj ekmilitis unu kontraŭ la aliajn dum la intercivitana milito, Juan Lamonedo marŝis en la jaro 1936 en Almerion, kie li politike laboris en la provinca registaro.



Ĵurnalo *EL SOCIALISTA*, oficiala organo de la hispana partio PSOE kie verkis ofte kaj laboris kiel redaktoro Juan Lamonedo Fernández.

Kiam finiĝis la milito Juan Lamonedo ekziliĝis en Francion, tie li restis en koncentrejo ĝis decembro de la jaro 1939, kiam li sukcesis enŝipiĝi en la Dominikan Respublikan, tie li loĝis ĝis la jaro 1941. Poste li iris en Meksikon, en ĉi tiu amerika lando jam loĝis du fratoj de Juan Lamonedo. En Meksikio li laboris en kelkaj oleo-entreprenoj kaj li ankaŭ publikigis artikolojn en naciaj ĵurnaloj kiel *Excelsior* aŭ *El Universal* sub la pseŭdonimo “El Chico de la Cana”.

En Meksikio Juan Lamonedo, kiu apartenis al la fraccio de la hispana socialista partio gvidita de la ĉefministro Juan Negrín, kontraŭstaris al la oficiala partio PSOE kaj pro tio oni elpelis lin de la socialisma hispana partio en la jaro 1946. En Meksikio li daŭre laboris kiel ĵurnalisto, li eĉ atingis tie literaturajn premiojn. Juan Lamonedo Fernández forpasis en Meksiko en la jaro 1960.



Historia Arĥivo de Andaluza Esperanto-Unuiĝo  
Apartado de Correos 611  
14080 Córdoba ~ cordoba@esperanto.ac

## FLAMENKO

### *“Trillera”, la sen-gitara kantaĵo*

La *trillera* (prononcu: *trijera* aŭ *trijera*) estas flamenka kantaĵo bazita sur alia kanto popola, certe ne andaluzia sed kastilia, ligita al la kamparaj laboroj. La vorto “*trilla*” estas la hispana traduko de “*draŝado*”, tio estas, la trado aŭ batado de la rikoltitaj grenoj, por malfiksi kaj apartigi la grajnojn.



La terkulturisto draŝas la rikoltitajn grenojn  
kun la helpo de muloj

Laŭdire, en Andaluzio *trillera* nur estas kantata en la provincoj Jaeno kaj Kordovo. Unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de kantaĵo *trillera* estas la fakto, ke la kantisto ne estas akompanita de gitaroj, tiel la ritmo nur estas tenita de akutaj tintiloj kiuj memorigas la tintilojn pendumitajn sur la jungilaroj de la muloj helpantaj la terkulturistojn draŝi. Dum la kantaĵo ofte aperas ankaŭ ekkrioj de la propra kantisto kiu similas al tiuj ekdiritaj de la terkulturisto por preni la brutaron.



La ofta strukturo de la *trillera*-kantaĵo estas jena: temas pri koplo kun kvar strofoj, la unua kaj la tria sepsilabaj kaj la dua kaj kvara kvinsilabaj. Ĉi tiu lastaj metas rimojn en la fino de la verso.

Sendube la plej fama kantisto pri ĉi tiu flamenka stilo estis *Bernardo el de los Lobitos*, sevila kantisto (1887-1969), kiu flamenkigis *trilleras*. Pri la temoj kantitaj, la *trillera* estas alloga kantaĵo, simpla, foje eĉ naiva, kies tekstoj estas sen-malicaĵ, tamen alifoje ili parolas pri gravaj aferoj kiel la afliktojn de la terkulturistoj.

Agraj terkulturistoj  
teron plugas  
kaj en sulkojn la grenojn  
ili tuj puŝas.

Povruloj poste scios  
ĉu ĉio en ord'  
kiam fine de l'jaro  
okazos rikolt'.

Semita kampo estas  
por povrulo  
fido kaj esper', por riĉul'  
nur aventuro.



Bernardo Álvarez Pérez  
*Bernardo el de los Lobitos*  
Alcalá de Guadaíra 1887 – Madrido 1969

## ANDALUZIA KUIRARTO

### *“Jibias con gurumelos”*

### *(Sepioj kun fungoj cezaraĵ amanitoj)*

Nur en la onuba provinco oni povas miksigi fiŝaĵon kaj la plej bongustajn produktojn de la arbaro: la fungoj. Ĉi-recepte ni uzos la fungon konitan en Onubo kun la nomo *gurumelo*. Temas pri la “cezara amanito”, ĝi estas manĝebla, sed atentu, pro la fakto ke kelkaj variantoj de la fungo amanito estas ege venenaj kaj eĉ mortigaj, kiel la faloida amanito. Do, certigu, ke temas pri *gurumelo* (cezara amanito).

#### Jen la ingredientoj:



- Fungoj “cezaraĵ amanitoj”: 300 gramoj.
- Sepio: 1 kilogramo.
- Faboj: ½ kilogramo.
- Cepo.
- Ajleroj: 3
- Laŭro.
- Papriko: 1 kulereto.
- Kumino.
- Blanka vino.
- Akvo.
- Oliv-oleo
- Salo.

#### Jen la preparado:

1. Haketu la cepon kaj friktu ĝin ene de kaserolo kun oliv-oleo. Aldonu la paprikon.
2. Aldonu la sepion, tranĉita laŭ bendoj. Aldonu ankaŭ la fabojn (senŝeligitaj).
3. Aldonu la fungojn, tranĉitaj laŭ lamenetoj. Movu ĉion.

4. Aldonu la laŭron (unu aŭ du folioj); iomete da komino kaj la blankan vinon.


5. Varmigu ĉion. Aldonu akvon ĝis kiam ĝi ekbolos. Sepio kaj faboj devas esti malmolaj.

6. Bonan apetiton !!


### Ĉi-recepta vortaro:



Fungo



Sepio




Faboj



Cepo



Ajlo / Ajlero



Laŭro



Papriko



Kumino



Blanka Vino

## Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

### La kastelo / hotelo de Sankta Katerino en Jaeno

Verŝajne en Jaeno troviĝas la sola hotelo en la mondo kie gasto skribis jenan reklamacion:

*“Mi ne povis dormi sufiĉe bone, pro la fakto ke fantomo ĝenis min dum la tuta nokto per pordo-batado.”*

Jes, tiu loko troviĝas en la andaluzia urbo Jaeno kaj temas pri luksa kaj belega ŝtata hotelo kiu situas en la kastelo de Sankta Katerino. Ĉi tiu fortreso superrigardas la tutan urbon Jaenon, la islamanoj konstruis ĝin dum la 8-a jarcento kaj poste la kastiliaj reĝoj pligrandigis ĝin dum 13-a jarcento. La kastelo ricevis la nomon de Sankta Katerino (*Santa Catalina* en la hispana lingvo), ĉar, laŭdire, la urbo Jaeno estis konkerita de la kastilia reĝo ĝuste la 25-a de novembro de la jaro 1246, kaj en tiu tago la katolika eklezio okazigas la feston de Sankta Katerino.



La Kastelo de Sankta Katerino superrigardas la urbon Jaenon

Dum la 6-a jardeko de la pasinta jarcento oni taŭgigis la kastelon kiel ŝtatan hotelon, tiel en la jaro 1965 oni inaŭguris ĉi tiun

novan luksan gastejon en la urbo, konsiderata nuntempe kiel unu el la plej belaj kaj allogaj hoteloj konstruitaj sur kastelo en Eŭropo. Tamen, la ĉambroj 22a kaj 23a estas fama ĉar, laŭdire, tie troviĝas fantomo. Okaze de ĵurnala intervjuo la direktoro de la hotelo asertis, ke li ne povas opinii pri tiu afero, ĉar kvankam li neniam vidis ĝin ja kelkaj gastoj kaj laboristoj de la hotelo travivis strangajn okazintaĵojn en ĉambroj kaj koridoroj.

Iunokte laboristino de la hotelo vidis strangan helan lumon post ŝi, kiam ŝi marŝis tra koridoro kaj kelkaj klientoj gastigitaj ĝuste en unu el tiuj ĉambroj, 22a aŭ 23a, rimarkis, ke la valizoj estis malfermitaj kaj ke la batadoj de pordoj kaj fenestroj estis oftaj.



Konestablo  
LUCAS DE IRANZO  
1453 - 1473

Ĉu okazis kelka stranga afero en tiu loko el la historia vidpunkto? Kompreneble, ĉar temas pri kastelo, sendube pri tiu loko oni rakontas dekojn da legendoj, krome Jaeno estas unu el la plej misteraj urboj en Andaluzio. Oni rakontas, ke en la kastelo loĝis islama amantino de la konestablo *Lucas de Iranzo*, ĉefkomandanto de la urbo dum la regado de la Henriko la 4-a, reĝo de Kastilio. La rilatoj inter la militisto kaj la amantino provokis malfavorajn opiniojn en la nobelaro de la urbo, pro la timo de la influo de islamano en la decidoj de la reganto de la urbo.

Kelkaj jaenaj nobeloj profitis foreston de la konestablo, ili eniris en la kastelon kaj bruligis la virinon en la ĉefturo de la kastelo, laŭdire ŝi gravediĝis. En tiu sama ĉefturo troviĝas hodiaŭ ĉambroj de la


nuntempa hotelo, do, iuj asertas, ke tiu virino post sia terura morto ankoraŭ priploras sian misfortunon en tiu sama loko. Kelkaj aliaj legendoj estas rakontataj, tamen tutcerte ĉiuj ili estas nur tio, allogaj legendoj. Tamen, la okazintaĵoj en la hotelo altiris la atenton de fama televida programo pri misteraj okazintaĵoj, do la respondeculoj de la programo instalas en la kastelo kameraojn kaj detektilojn, sed ili eltrovis nenion. Nu, la mistero daŭriĝas kaj hodiaŭ, de tempo al tempo, gastoj kiuj amas misterojn petas gastoj en unu el tiuj ĉambroj. Kaj Vi? Ĉu Vi kuraĝus? Kun fantomoj aŭ sen ili, Jaeno estas vizitinda urbo !

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo  
Asociación Andaluza de Esperanto

### **Direcciones útiles del movimiento esperantista en Andalucía:**

- ✓ En Málaga: [angelarquillos@gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)
- ✓ En Sevilla: [info@esperantosevilla.org](mailto:info@esperantosevilla.org)
- ✓ En Córdoba: [cordoba@esperanto.ac](mailto:cordoba@esperanto.ac)
- ✓ En Granada: [granada@esperanto.ac](mailto:granada@esperanto.ac)
- ✓ En Ronda: [arunda@esperanto.ac](mailto:arunda@esperanto.ac)
- ✓ En la Axarquía malagueña: [surlamar@hotmail.com](mailto:surlamar@hotmail.com)

## Nuda Krucvortenigmo




### *HORIZONTALALE*

- A. Finaĵo de akuzativo.
- B. Prepozicio esprimanta ĝenerala la celon.
- C. Plurale, loko en la haŭto, precipe ĉe piedoj aŭ manoj, malmoliĝinta kaj dikiĝinta pro frotado.
- Ĉ. Plurale, en kelkaj religioj spirita estaĵo, meza inter Dio kaj homo.
- D. Akuzative, elektre ŝargita formo de molekulo aŭ de atomo.
- E. En ĉi tiu momento.
- F. En la tajlandaj aŭtomobiloj.

**VERTIKALE**

1. Finaĵo de adjektivoj.
2. Inverse kaj sen la lasta vokalo, kolora likvo por skribi.
3. Akuzative, ĉiu el la du flankoj de paperfolio.
4. Inverse kaj akuzative, artefarita masonista subtera vojjalorio, borita tra monto aŭ sub rivero.
5. Akuzative, tio, kion devas diri aŭ fari aktoro en teatraĵo aŭ filmo.
6. Sen la lasta vokalo, alia vorto kiu egalas al tiu de Horizontale D.
7. Finaĵo de pluralo.


**Rebuso**

- Ĉu la afero iras bone ?

---



## Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



## Solvo al la pasintnumera Rebuso.

- *Kion vi ĉasis hieraŭ en la kamparo?:*  
**DU KUNIKLOJN**

Sur la bildo aperis 2 vortojn kiuj finiĝas per “IKLOJN”, konkrete: biciklojn kaj motorciklojn.

Do *Du vortoj kun “iklojn” = Du kun “iklojn” = Du kuniklojn.*

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?

Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?

Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac



## HUMURO



La numero 114-a de nia revuo aperos meze de la monato aprilo 2020. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

cordoba@esperanto.ac

GAZETO ANDALUZIA  
Apartado de Correos 3142  
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**  
**Asociación Andaluza de Esperanto**



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López  
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García  
Sekretario: José María Rodríguez Hernández  
Kasistino: María Dolores Torres Mateo  
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López  
                  Juan García del Río  
                  Carlos Spinola  
                  Alejandro Burgos Escalante  
                  Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj:     angelarquillos@gmail.com  
                  cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac  
              www.esperanto-andalucia.info

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)  
uea@inter.nl.net

\* Hispana Esperanto-Federacio  
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)  
admin@esperanto-es.net



*de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto  
2020  
en Montrealo (Kanado)*